FN PER ANC 47

# Normanda Esperanto Bulteno

Organe de l'Union des Espérantistes de Normandie

- Nº 59 - -Juillet 1961-

Redaktas: Sro HANNIER, 250, boul. Jean Jaurès-ROUEN

## Aux Espérantistes normands

La série de conférences publiques que j'ai récemment données dans notre Province (notamment à Aumale, Domfront, Caen...) sous le titre "PROBLEME de la LANGUE UNIVERSELLE" m'ont apporté une preuve nouvelle (et superflue) que nous étions sur la bonne voie, que notre publicité était féconde.

Mes obligations professionnelles m'obligent à modifier mes activités: je vais avoir la possibilité d'utiliser l'ESPERANTO sur le plan international...mais je ne pourrai plus (du moins provisoirement) servir de lien entre les Espérantistes normands comme j'ai essayé de le faire jusqu'alors.

Il ne s'agit que d'une conséquence des nouveaux courants commerciaux et je suis certain qu'il ne se trouvera pas un seul Espérantiste pour croire è une défaillance, à une dérobade de ma part.

J'exorte tous les Normands à se grouper autour de notre Président Maurice HUET qui, assisté d'un bureau particulièrement dynamique, saura tenir fermement le Flambeau...

Toute correspondance doit donc désormais ètre centrée sur le Comité directeur:

- M; Maurice HUET, Président, 63, boul. François Ier, LE HAVRE
- M. Gaston VERON, secrét. général, place Petite Bruyère, DOMFRONT
- M. COLLEU, trésorier, 20, Bd de la Buffardière, EVREUX
- M. HANNIER (bulletin) 250, Bd Jean Jaurès -ROUEN

## Vojaĝisto pri Esperanto petala

De post multaj jaroj, Sro Marcel BOSC trairas nian tutan regionon, de loko al loko, per flugiloj de facila ..., ne, ...per aùtomobilo, vizitanta la unuopajn Esperantistojn, la grupojn faranta prelegojn pri l'internacia lingvo, unuvorte, disvastiganta Esperanton.

Kiom da unuopuloj vizitataj ? Kiom da grupoj naskiĝis, aù renaskiĝis dank' al lia agado ? Bedaùrinde (al ni !), nia Honor-Prézidanto devas, pro profesiaj okupoj, vojaĝi eksterlanden. Kompreneble, li daùrigos propagandi Esperanton, sed li estos nur malofte en nia regiono.

Tiuokaze, mi deziras, denove, transdoni publike, al Sro BOSC, nian koran pro la laboro farita.

Ĉar ne devas malaperi tian vivan tan ligilon inter la grupoj, necesas ke "eksprucu" novan vojaĝiston. Efektive, sola en sia vilaĝo, Esperantisto emas opinii ke li estas forgesata. Vizitoj, eĉ maloftaj, forpelos tiun malveran ideon. Eble, neniu povos zorgi pri tuta Normandio, sed, pluraj povos viziti izolitajn amikojn, proksime al si. Kandidatoj bonvolos sin turni al Sro VERON, sekretario,

Sinjoro BOSC, nur estas ja revid'
Je la Nomo de l'Estraro de l'U.N.E.

Maurice HUET -Prez.

Je n'oublie pas ceux et celles qui ont combattu à mes côtés avec foi et persévérance: je leur adresse mes sincères amitiés...et puis quand même...ce n'est qu'un "AU REVOIR".

Marcel BOSC
Président honoraire

# Raporto pri la 30ª NORMANDA KONGRESO

Praktike la kongreso ekiĝis la sabaton 6 an.de Majo je I4 hº kiam S-ino VINCENT,prezidantino de LKK,helpata de sia Komitato akceptis la kongresontojn en la Salono Chedeville,dum kiam Doktoro BONNET disdonis la dokumentojn kaj enkasigis la kongresaliĝojn. S-ino VINCENT ekvizitigis la esperanto-ekspozicion publikan organizita de tiea grupo,kaj salutis alvenantojn Esperantistojn (Sron.GASSE,normanda veterano,Sron BOSC,honorprezidanto de U.N.E.,Sron.GUILLAUME,UEA-ĉefdelegito,Sron.ROUGETET,UEF-komitatano,Sron.CILIGA,komitatano de Pariza Esp.-GRupo, ktp... S-ron BOSC,sia vice,akceptis Sron.TOMASINI,deputito de departemento Eure,Sron.SIINO,direktoro de Lernejo pri Militpreparo,ktp...


La vespero estis gaja.Kantoj de la grupoj de Les Andelys kaj Evreux,lumbildoj pri kulturdomo Grésillon,diversaj amuzaj teatraĵoj kaj folkloraj dancoj. Rimarkinda sonbendo pri vivo de Zamenhof (intervjuo de Radio-Luxembourg).

Kaj fine elekto de F-ino.ESPERANTO kaj honorfraŭlinoj.

La komitato (S-ino.BELLETTRE,Sro GASSE kaj Sro BOSC) decidis pri jena rezultato : Reĝino F-ino.Chantal DESJARDIN,honorfraŭlinoj: F-inoj.Dominique VASSEUR kaj Andrée ANFROY.kiujn Sro.BOSC gratulas (je la nomo de Sro.Maurice HUET,U.N.E.-prezidanto).Li donas la donacojn de la komercistoj de Les Andelys.Vespero familia sub la signo de bonhumoro.

Dimanĉon la 7 an.je la 8a. rimarkinda katolika diservo de Pastro RUNPAOT (granda seminario de Evreux) Evanligio esperantlingva, kantoj esperantlingvaj efektiva partopreno de niaj Amikoj VERON kaj COLLEU..la kantistinoj de Evreux.

Poste ekiĝis la publika kunveno de U.E.F.-anoj.Prezidas samtempe du malnovaj Amikoj Sro.Jean GUILLAUME kaj Sro.Marcel BOSC (lernintoj de Sro GASSE en Le Havre dum... I926) la diskuto varmiĝas.Sro.GUILLAUME konstatas ke pluraj normandaj esperantistoj ne aliĝis al UEF/UEA kaj deziras ke la kurs-gvidantoj aliĝigu ĉiujn novaln lernantojn. UEA reprézentas ĉe oficialaj instancoj ESPERANTO'n.Sro BOSC (membro de UEF-UEA, delegito de UEA) kompreneble ne kontraŭdiras pri tiu fakto...tamen li rigardas kiel samideanonon tiu kiu ne sendis sian aliĝon sed partoprenas la propagandon en Normandujo.Post longa diskuto Sro GUILLAUME petas ke ĉiu grupo elektu (interne) iun membron kiu almenaŭ respondos al la leteroj, de la UEF-komitato.Ĉar ESPERANTO estas frata afero ĉiuj konsentas pri tio.



Je la 9a.Sro Maurice HUET,prezidanto de la Normanda Unuiĝo, oficiale mal fermis la 30 an.normandan kongreson. S.ino VINCENT,prezidantino de la LKK salutis la kongresistojn kaj dankis siajn kunlaboristojn.

Sro Emile GASSE,je la dekstro de Sro HUET prezidas la laborkunsidon dum kiam Sro BOSC,direktas la debaton.Morala raporto legata de Sro HUET (je la nomo de Sro MAMMAUX).Financa raporto ankaŭ legato de Sro HUET (je la nomo de Sro LETENDRE)...Poste; raporto de ĉiu grupo. LES ANDELYS: S-ino VINCENT parolas pri kurso kaj propagando de la juna grupo. CAEN : F-ino CHERIE kaj Sro MARTIN diras siajn esperojn pri la venontaj kursoj.

(vidu paĝo 4a)

## fécamp

- Dum la lastaj ekzamenoj en Le Havre,tri gelernantoj sukcesis trapasi la ekzamenon "Atesto pri Lernado" .Iliaj nomoj : S-ino Luçie COLOMBEL,F-ino Renée CLEMENT,S-ro Jean COLOMBEL.

- La Grupo sukcesis resonbendigi la konatan soubandon "La Famaj rekonatuloj",fortranĉante la reklamon pri B.N.C.I.,kaj anstataŭante ĝin per kelkaj paroladoj kaj la himno "La Espero".

- La"Franca esperantisto",en la numero de majo, publigis la unuan liston de la profesoroj aprobitaj de la lerneja komisiono por la instruado de Esperanto en la publikaj instruaj lernejoj.Inter la nomoj,ni legis la nomon de S-ro PERMANNE.

- Nune,la grupo malpliaktiviĝas,sed tamen laboras senhalte kaj senbrue.

-Firmao fame konata "BENEDICTINE" ĵus eldonis menuojn en eŭropaj lingvoj...kaj esperanto.Tiu sukceso rekompensas la senlacan laboron de tiea grupo (precipe nia sindonema Samideanino Jeannine COMTE) - Jam jarlibro de U.E.A. reklamas por "BENEDICTINE".

## le havre

:-Okazis,la I8 an de Junio,ekzamenoj : dekduo da kandidatoj.Ni deziras al ili sukceson.

-Kursoj : La malnova ĉambro rue Jules Lecesne,ne plu vidos niajn gelernantoj ,ĉiuvendrede ! Sed,ni povos uzi modernan ĉambron,Boulevard François Ier,ĉiusabate; ni esperas ke tiu translokiĝo ne tro malhelpos nian agadon !

- S-ro GASSE,Fondinto de la Havra Grupo de Esperanto,forlasas nian urbon.Tiuokaze,ni devos danki kaj gratuli nian pioniron, kiu,de post 1905 (jes ! ) tiom faris por Esperanto.Al li,ni konatigas nian bedaŭron.Ni deziras al li feliĉon kaj longan vivon !

## rouen

:- La proksimaj kursoj okazos la vendrede 22 septembro,I6I,strato Beauvoisine.

- La unua kunveno de preparado pri la Normanda kongreso 1962,okazos ĉirkaŭ la 26 an de tio monato.

Attention ! : AVEZ-VOUS REGLE VOTRE ABONNEMENT I96I au "NORMANDA ESPERANTO BULTENO " ?
Si vous avez oublié,ADRESSEZ VITE 2 NF àu trésorier Sro COLLEU,20,boul.de la Buffardière à EVREUX.
Vous aurez ainsi également réglé votre adhésion à U.E.N.

LES ROUENNAIS COMMENCENT A RASSEMBLER LES IDEES POUR FAIRE DU 3Ie CONGRES UNE GRANDE MANIFESTATION ESPERANTISTE QUI DEVRA EGALEMENT ATTIRER L'ATTENTION DU PUBLIC.ILS VOUDRAIENT BIEN,QU'A CETTE OCCASION,ON INAUGURE UNE "RUE ZAMENHOF" ...

30a NORMANDA KONGRESO (daùrigo)

ili substrekas sian propagandon en la Instruad-Fakoj.-ROUEN : Sro JOUIS parolas pri la ĉiumonata kunveno de la grupo,Sro QUILLAU pri la kurso gvidata de li...kaj ankaù,je la nomo de fervojistoj pri la propagando kaj la kursoj de samideanoj LOISEL,ROUSSIER,LEPRETRE...ktp.-ELBEUF : estas sSro CHAMARET kiu prezentas sian viglan laboron ĉe auto-fabriko "Renault en Cléon : li eldonas bultenon (kun ampleksa parto por ESPERANTO ) kaj nepre intencas gvidi kurson dum aùtuno venonta.-FECAMP : Sro BOSCsciigas al la kongresistoj ke 2 kursoj funkcias en tiu-ĉi urbo (Sro PERMANNE kaj F-ino GILLET) -EVREUX : Sro COLLEU raportas pri siaj 2 kursoj: por la steno-lernejo de F-ino MONTAGNE kaj por la lernantinoj de "La Miséricorde". - LE HAVRE : Prézidanto Maurice HUET substrekas la propagandon de la neutrala grupo kaj ĝiajn kursojn , Sro STEPHAN,diras kelkajn vortojn pri la movado en laborista-fako (S.A.T.) -VIRE : Sro SAPERAS raportas pri sukcesoj trafitah...kaj venontaj.

Por DOMFRONT ,Sro VERON parolas pri taùgeco de la lasta kongreso en oficialaj medioj,pri siaj kurosj kaj bedaùras ke silento de pluraj gesamideanoj malhelpis la organizon en DOMFRONT de internacia renkonto antaù la universala kongreso en Harrogate.Tamen li konservas optimisman subridon pri fina triomfo de ESPERANTO en suda parto de nia provinco.

Sro BOSC legas kelkajn leterojn de nepartoprenantoj : Sro LETENDRE (Le Havre),Sro SAGET (Elbeuf), Sro BRAJEUX,senatoro de la departemento,saluttelegramon de Kastelo Grésillon kaj de multnombraj eksterlandanoj..ktp.

Jen la elekto de la nova komitato 1961 . Sro GASSE forlasas la prezidantan seĝon dum kiam Sro BOSC legas la liston de la nunaj komitatanoj kaj la regularon pri la elekto. F-inoj CHERIE kaj MONTAGNE,administrantinoj forlasas mem sian oficon.

La baloto donas:
HUET,VERON,POTTIER,SAPERAS, MAMMAUX,LETENDRE,HANNIER,COLLEU, QUILLAU,VILLETTE,CHAMARET.

Post diskuto inter la elektit. Sro BOSC donas publike la rezultaton

Prezidanto: Sro M.HUET (Le Havre)
Vicprezidantoj: Sro SAPERAS (Vire)
Sro POTTIER (Blangy)
Kasisto: Sro COLLEU (Evreux)
Ĉefsekretario : Sro VERON (Domfront)
Bulteno : Sro HANNIER (Rouen)
Helpkasisto : Sro VILLETTE (Evreux)
Helpsekretario: Sro CHAMARET (Elbeuf)
Propagandisto: Sro QUILLAU (Rouen)
Administrantoj: Sroj MAMMAUX kaj LETENDRE (Le Havre)

----

La venonta kongreso regiona okazos en ROUEN dum majo 1962. Sro JOUIS konsentas je la nomo de Rouen'a grupo.Li atendas la helpon de la Samideanoj de Rouen'a regiono precipe "Esperantistaj fervojistoj de Sotteville ".

Akcepto en Urbdomo de Sro CHENEAUX DE LEYRITZ,Urbestro.Pluraj cirkonstancoj okupas lin : la akcepto estis mallonga kaj neoficiala...sur la ŝtuparo de la urbdomo la kongresistoj estis kaptataj de la fotografisto.

Poste "déjeuner à la française" en hotelo "Les Trois marchands" kaj promenado al "Château Gaillard " (nekomparinda vidaĵo al Sejna valo).

ĜIS LA REVIDO EN ROUEN,
VENONTAN JARON !
...ce n'est qu'un AU REVOIR...

NOTU : La kongresaj fotoj estas pretaj -poŝtkart formataj - po 1,20 NF por unu - Mendeblaj al S-ino VINCENT,LES ANDELYS - CCP.Rouen 574.88

-Plie restas stoko da memorigaj kartoj -kun vidaĵo de Kastelo Gaillard -Vi uzu ilin kiel poŝkartojn mendeblaj al S-ino VINCENT : po 1 NF por 10 kartoj.

# MIA UNUA EKSTERLANDA ESPERANTISTA VOJAĜO

Okaze de la Pentekosto,la Esperanta fervojisto grupo de ROUEN organizis ekskurson al HAGO (LA HAYE) ,pere de esperantista grupo el tiu urbo. Kiel ili afable invitis nin,mi partoprenis tiun vojaĝon kaj mi havas de tia bonegan memoron.

Ni estis akceptitaj korage en la stacidomo de HAGO per la esperantistoj kiuj devis gastigi nin dum nia restado.Vespere niaj nederlandaj amikoj organizis koran kunvenon en nia honoro.Dum tiu kunveno S-ro ROUSSIER montris kelkaln kolororajn fotojn faritajn en Rouen kaj niaj nederlandaj amikoj montris kelkajn fotojn pri Nederlando. Tiel estis nia unua kontakto kun HAGO.

Dum la du aliaj tagoj ĉiu vivis en unu familio.Ĉi tio konogis al ni la nederlandan vivmanieron.La unua premsigno estas ke ĉio estas pura sed rigora.Ni vizitis HAGON kaj ĝian palacon,la standon de SCHEWENINGEN,la parkon de MADURODAM kiu reprezentas miniature la karakterizajn trajtojn de Nederlando,fine la malnovan urbon de DELFT. Dum niaj vizitoj ni renkontis finlandan esperantiston kaj du germaniajn esperantistinojn.

Laùlonge de niaj ekskursoj niaj nederlandoj amikoj gvidis nin kun afableco.Cetere la ĉefa premsigno kiun ni konservis de tiu vojaĝo estas la simpatio kun kiu ni estis gastigintaj kaj mi deziras ke tiuj kontaktoj kun eksterlandaj esperantistoj estu oftaj.

Denise HUHOT
(faringinte E. de Okt.1960)

---

# Fervojista renkontiĝo en Rouen

La II-an de junio la Fervojista grupo de Rouen-Sotteville kiel la antaùaj jaroj,invitis siajn gekolegojn por trapasi normandan tagon,al tiu renkontiĝo estis kore invititaj ankaù la nefervojistojn. Tri-dek naù geesperantistoj partoprenis tiun amikan tagon.

Je la I0-a horo en la stacidomo estis akceptitaj de la Rouen'anoj la 22 geparizanojn,Dieppanojn kaj aliajn,ĉiuj ariĝis en la stacidomo.

Post rapida pieda promenado tra la urbo,malavare baptita de la ĉielo,la partoprenantoj sin retrovis ĉe tablo sur kiu estis oferita bongustan kaj abundan tagmanĝon. Bedaùrinde ĝi devis esti rapide enstomakigita pro la horaro de la ŝipeto.Ĉiuj enŝipiĝis je la I4-a por veturi ĝis La Bouille,ĉarma urbeto for de I8 km,per la agrabla "Seine" vojo.

Laùlonge de tiu promenado, iro kaj reiro,inter la turismaj klarigoj,lerta akordonisto ankoraù pliagrabligis la vojaĝon.En La Bouille,ĉiuj ekskursis ĝis la malnova kastelo de "Robert le Diable" kies la interno estis vizitata.

Denove,je la I8-a ĉiuj reenŝipiĝis por reiri en Rouen. Notinda estas ke la pluva vetero de la mateno fariĝis suna dum la tuta posttagmezo.

Finfine,post rapida vizito al la monumento starigita honore al la heroino Jeanne d'Arc,kaj la loko de ŝia bruligo,la disiĝo okazis en la stacidomo de Rouen.

Tago tute agrabla,amikece markita,kiel ĉiu esperantista renkontiĝo,tiel estis la Fervojista tago en Rouen,la II-an de Junio.

Rendevuo venontan Jaron...

# Internaciaj rilatoj ...

En sufiĉe grandaj urboj la grupoj ricevas ĉiujare pluraj vizitoj de alilandaj samideanoj,kio aparte taŭgas por la propagando.

Sed tiajn vizitojn la urbetaj grupoj ne ricevas.

Laŭ Licea Profesorino COLLEU,en Le Havre,kontraŭ tio oni povus rimedi se grupanoj interŝanĝus gastadon dum unu aŭ kelkaj semajnoj kun alilandanoj.

Kaj ĝuste en la urbetoj,krom la oportuno por paroligi la grupanojn,la propaganda efiko estus ankoraŭ pli granda ol en la gravaj urboj.

U.E.A. gazeto kaj Heroldo taŭgas por ricevi viajn anoncetojn.Provu kaj poste konigu viajn rezultojn al N.E.B. ! ...

# kaj propagando.

Emile GASSE

---

Ni iru al Grésillon !..

Ni iru al Grésillon !..

KASTELO " GRESILLON " - BAUGE (Maine et Loire)

Durant vos vacances,vous vous devez de prendre contact avec la MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE - Tel 34 à BAUGE.- vous ne le regretterez pas. Le chateau de Grésillon est situé à I.500 m de la sortie de BAUGE,sur la route du Lude.Des autobus partent de Tours et Angers pour BAUGE.

Vous rencontrerez très certainement des esperantistes étrangers et ne manquerez pas de vous créer d'excellentes relations.En participant à l'un des stages,vous pourrez enrichir vos connaissances et parfaire votre ESPERANTO.

Du 8 AOUT au 29 AOUT

SEMAINES ESPERANTISTES & CULTURELLES

Du mercredi 9 au lundi 28 août,chaque jour,de 9h à IIh30:
- Cours de débutants (M.JELLENC)
- Cours d'acquisition pratique (M.THEBAUD)
- Cours supérieur (M.BABIN)

l'après-dmidi :
- vannerie et reliure,
- conversations sous la direction des professeurs,
- soirées récréatives et culturelles,
- excursions ,baignade,pèche,repos.

QU'EN PENSEZ-VOUS ?

Ni iru al Grésillon !..